

# 10

# KVERKO

*Quercus Palustris*

 2017

La kverko prave nomiĝas la reĝo de la arbaro. Ĝi estis sankta arbo por keltaj kaj ĝermanaj popoloj: la saĝo de la druido estis solida kiel kverko. Pro sia profunda radikaro la kverko estas natura fulmokaptilo (kaj tiel la arbo por superaj dioj). Ĝi povas vivi ĝis mil jaroj kaj provizas rifuĝon dum kaj post sia vivo al grandega nombro da bestoj: insektoj, fungoj kaj muskoj. Ĝi ankaŭ dependas de ili: sen la garolo kaj la sciuro liaj glanoj ne distanciĝus de la arbo. Glanoj estis la ĉefa manĝaĵo de porkoj en la mezepoko. Ili estas venenaj por homoj kaj ĉevaloj pro sia alta tanina enhavo, kiu tamen estas utila por tanado de ledoj. El la glanoj fareblas ankaŭ kafsurogato. Kverka ligno povas fariĝi tra la jaroj same malmola kiel fero: vere fere forta. Ĝi estas valora materialo por konstruado de tegmentoj kaj boatoj. En la Ora Epoko de Nederlando por konstrui unusolan batalŝipon okazis, ke oni forhakis eĉ 3 700 kverkojn. Kverkoj ekzistas en ĉiaj specoj: ĉi-tiu estas marĉa kverko, do nek korkokverko, nek 'trufa kverko'.



[www.josvertelt.nl](http://www.josvertelt.nl)



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

